XII ordinara tempo – 20an de junio 2010

VI ESTAS LA KRISTO DE DIO. LA FILO DE HOMO DEVAS MULTE SUFERI

Komento al la Evagelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 9,18-24

Iun tagon Jesuo troviĝis en soleca loko por preĝi. La disĉiploj estis kun li kaj li prezentis al ili tiun demandon: «La homamasoj, kiu ili diras ke mi estas?" Ili respondis: «Johano la Baptisto; aliaj diras Elija, aliaj unu el la antikvaj profetoj kiu resurektis».

Tiam li demandis al ili: «Sed vi, kiu vi diras ke mi estas?». Petro respondis: «La Kristo de Dio».

Li severe ordonis al ili tion rediri al neniu. «La Filo de homo – li diris – devas multe suferi, esti rifuzita de la pliaĝuloj, de la ĉefpastroj kaj de la skribistoj, esti mortigita kaj resurekti la trian tagon».

Poste al ĉiuj li diradis: «Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin mem, prenu sian krucon ĉiutage kaj sekvu min. Kiu volas savi sian vivon, li ĝin perdos, sed kiu perdos sian vivon pro mi, tiu ĝin savos».

La kundivido de la panoj kaj de la fiŝoj estis gesto klare mesieca. Oni pensis ke la nova Mesio devintus refari la gestojn de la unua Mesio, de la unua imperiestro, nome de Moseo.

Kaj kiel Moseo malsuprenirigis de la ĉielo la manaon, tiel la Mesio devintus refari ion simila. Tiam, antaŭ la rezulto de tiu kundivido ni vidas kiu estas la reago de la disĉiploj kaj de la homamaso.

Skribas Luko ke "Jesuo troviĝis" ne en soleca loko kiel laŭ la traduko, sed "sola". La evangeliisto substrekas la solecon de Jesuo. "Por preĝi", kaj Jesuo preĝas en la plej gravaj momentoj de sia ekzisto, en la malfacilaj momentoj. Kaj ĉi tie evidentas ke la preĝo estas por liaj disĉiploj; estas ili kiuj ne tion komprenas.

"La disĉiploj estis kun li", la disĉiploj ne aliĝas al la preĝo de Jesuo; ili akompanas Jesuon, sed, reale, ne sekvas lin. "La disĉiploj estis kun li" kaj estas Jesuo kiu ion iniciatas kaj starigas al ili tiun ĉi demandon: "La homamasoj kiu ili diras ke mi estas?" Antaŭe Jesuo sendis ilin anonci la regnon de Dio, do ni vidas nun la rezulton de tiu predikado, kion la homamasoj komprenis.

La rezulto estas elreviga “Ili respondis: «Johano la Baptisto»”, sed Johano la Baptisto jam mortis, estis Herodo kiu estis obsedata de la ideo ke Johano la Baptisto estus resurektinta. “Aliaj diras al li «Elija»”, Elija estis la batalema profeto tre fervora, kiu devis alveni antaŭ la Mesio. Tio kio kunigas Johanon kaj Elijan estas la fakto ke ili ambaŭ estas personecoj prezentantaj religian bildon de Dio: tiu de iu Dio malgaja, ekzekutisto, la Dio kiu punas.

“Kaj aliaj «Unu el la antikvaj profetoj»”. Pro la maltrafa predikado de la disĉiploj, la homoj ne komprenis la novaĵon portitan de Jesuo; Jesuo ilin sendi paroli pri la Dia regno, sed ili ne komprenis. Tiam Jesuo ree iniciatas kaj “demandis al ili: Sed vi kiu vi diras ke mi estas?’, nome “sed almenaŭ vi komprenis kiu mi estas?”.

“Respondis Petro”, tiu disĉiplo, ni scias, nomiĝas Simono. Kiam la evangeliisto volas substreki ke tiu kontraŭstaras aŭ kontraŭdiras Jesuon, citas li nur per la negativa kromnomo. Do ni jam scias ke la respondo de Simono ne estas ĝusta.

“Petro respondis: «La Kristo de Dio»”. Jesuo estis anoncita de la anĝeloj al la ŝafistoj kiel ‘Kristo Sinjoro’ ne la Kristo. Kiu estas la diferenco? La Kristo, kun la determina artikolo, en la greka lingvo indikas tiun kiu jam estas konata, tiu kiun oni scias. Tiam Petro respondas: “Vi estas la Kristo de Dio”, nome la filo de Davido, tiu atendata de la tradicio; la reĝo, la Mesio kiu, perforte, devus inaŭguri la regno de Izraelo.

La fakto ke Petro ne bone respondis, videblas per la reago de Jesuo. “Sed li severe lin riproĉis”, la evangeliisto uzas la saman verbon kiun li uzas kontraŭ la demonhavantoj por ilin liberigi de ilia fanatika ideologio. Do tio kion Petro diris ne estas laŭa kun Jesuo, kiu rigardas al li kiel iu demonhavanto. Do ‘li riproĉis’ ne nur ilin, sed la tutan grupon kiu samopinias kun tio kion diris Petro.

“Kaj li ordonis tion rediri al neniu”, ĉar Jesuo ne estas tiu Kristo atendata de la tradicio. Jesuo jes estas la Mesio, sed en maniero tute nova. Li ne iros okupi la povon, ne iros forpreni la vivon, sed oferi sian vivon. Kaj tiam Jesuo, dank’ al sia granda pacienco, refoje klarigas: “«La Filo de Homo... »”, Petro diris ke Jesuo estas la Kristo de Dio. Jesuo male parolas pri la Filo de homo. Filo de homo estas tiu kiu havas la dian kondiĉon.

Jesuo estas Filo de Dio, ĉar li reprezentas Dion en lia homa kondiĉo, kaj estas Filo de Homo, ĉar li reprezentas la homon en lia dia kondiĉo. “«la Filo de Homo devas multe suferi kaj esti rifuzita»”, kaj ĉi tie la evangeliisto prezentas al ni la sinedrion, kiu konsistis el 71 membroj, kaj kiu konsistis “el la pliaĝuloj”, la ekonomia aristokratio, “de la sacerdotestroj kaj de la skriboj”, la oficialaj teologoj.

“«Esti mortigita»” la religia institucio malamikas al la projekto de Dio pri la homaro, ke la homo iĝu lian filon, ke la homo havu la dian kondiĉon, tio por la religia institucio estas netolerebla krimo, do “«esti mortigita kaj resurekti la trian tagon»”.

La nombro tri indikas tion kio estas completa, kio estas definitiva. Kaj poste jen la admono de Jesuo, adresita al liaj disĉiploj, kiuj, kiel ni jam diris, lin akompanis sed ne lin sekvis. “«Se…»” ĝi estas propono, ofero, “«… iu volas veni post mi…»” la mesaĝo estas adresita al Petro kaj al la disĉiploj kiuj ne estas

malantaŭ Jesuo, sed iras kontraŭ li, “*«*… abnegaciuu sin mem… *»*” nome rezignu je siaj idealoj de gloro kaj de naciismo kaj, laŭlitere, “*«*surprenu sian krucon*»*”.

Kion signifas tio? Kiam la kondamnito estis mortkondamnita per krucigo, li devis per si mem suprenlevi la horizontalan eŝafodon kaj poste, de la tribunalo, li devis iri al la ekzekutejo trairante du hom-aloj por kiuj estis religia devo lin insulti kaj bati, tio estas la kompleta soleco.

Jesuo ne estas ĉi tie parolanta pri la morto surkruca, fakte li diras “*«*prenu sian krucon ĉiutage*»*”, li estas parolanta pri la soleco kiun li spertas – ni memoru ke komence de tiu peco Jesuo estis prezentata tute sola – estas la soleco de tiu kiu sekvas la Dian projekton, kiu estos rifuzata ĝuste de tiuj kiuj devintus lin kompreni.

Do ĉi tie Jesuo ne donas la bildon de kruco kiel la doloroj, la suferoj, kiel nuntempe oni kutimas diri, sed la akcepto de la perdo de propra reputacio, kiu kondukas al kompleta soleco. “*«*Kaj poste tiu sekvu min*»* ”, estas do la mesaĝo adresita al liaj disĉiploj.

Kaj laste jen la finaĵo “*«*Kiu volas savi sian vivon*»* ”, nome kiu volas realigi sin mem, “*«*tiu ĝin perdos, sed kiu perdos propran vivon pro mi, tiu ĝin savos*»*”, por Jeuso doni ne estas perdi, sed kiu volas realigi sin mem pere de tiu bildo de sukceso kaj de povo iras renkonte al ruiniĝo. Kiu male, sekvante Jesuon, fordonos sian vivon por la aliaj, tio ne estos grava perdo, sed estos ĝin retrovi en pleneco.